

La revuo Svisa Espero fariĝis 75-jara. Sepa parto
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 750, 1978.02.22 & 24 & 25

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Dum prelegaro ni prezentos al vi historion de la esperanto-movado en Svislando helpe de tekstoj, kiujn ni ĉerpos el la revuo Svisa Espero. Ni tiel markas la 75-an naskiĝjaron de Svisa Esperanto-Societo.

A.- Okaze de la unua Kunveno de Svisa Esperanto-Societo la 27-an de septembro 1903, profesoro Théophile Cart diris:

Cl.- «La antaŭan jaron ni estis kelkaj en Svisujo, nun ni estas pli ol cento, la venontan jaron ni estos pli ol mil.»

A.- Tiu iom facila optimismo fontis el la realeco. Théophile Cart konatiĝis kun Esperanto en 1894, sed nur en 1901 li ĝin eklernis. Tiam en Svislando ekzistis apenaŭ dek esperantistoj. Li konatiĝis kun la fratoj A. kaj H. Dubois, kun Theophile Hopf kaj Ernest Naville, la unuaj esperantistoj en Svislando. A. Dubois, tiam direktoro de la komerca lernejo en la urbo Le Locle, faris en 1898 paroladon pri esperanto. Lia frato H. Dubois fondis en Ĝenevo la unuan Esperanto-Grupon sub la nomo 'La Stelo'. Theophile Hopf en Thun eldonis varbilojn, kaj la filozofo Ernest Naville, kiel ni vidis en pasinta prelego, skribis artikolojn pri la Lingvo internacia, kiuj altiris la atenton de multaj scienculoj.

Cl.- Théophile Cart, kiu estis sviso, regule feriis en Svislando. Li tre aktive partoprenis en la esperanto-vivo de nia lando, akceptante organizi prelegvojaĝojn profite al la naskiĝantaj esperanto-rondetoj, alportante utilajn konsilojn al la gvidantoj, malavare subtenante la propagandistojn. Kaj li havis la plezuron povi mezuri la unuajn rezultojn de tiuj agadoj, kies kunordiganto li fakte estis, tio ĝis kiam en Svislando mem ekzistis organizita movado.

A.- La granda iluzio de Théophile Cart, kaj de liaj amikoj, estis kredi, ke la ritmo de la progresoj estos konstanta. Fakte, kiel por ĉiuj aferoj, la ritmo de la kreskado de Esperanto tute ne estas konstanta. Ĉiu progreso, se ĝi estas sufiĉe grava, kondukas al nova situacio. Nur mastrado de tiu situacio povas ebligi novajn progresojn.

Cl.- En 1902 ne ekzistis organizita movado, kio lasis multe da agada libereco al la propagandemuloj. En 1903 estis fondita societo kaj multaj lokaj grupoj. Subite la propagandistoj devis fariĝi gvidantoj de societoj kaj de grupoj. Ili alfrontis plej diversajn problemojn: doni kursojn, kunordigi la intergrupan vivon, redakti gazeton, alfronti financajn malfacilaĵojn, eviti konfliktojn, organizi festojn kaj kunvenojn.

A.- Ĉio tio klarigas, kial se en 1902 la esperantistoj estis malpli ol dek, se en 1903 ili estis pli ol cent, ke en 1904 ili ne povis esti jam pli ol mil, kiel esperis Théophile Cart.

Cl.- Jen kelkaj nombroj, kiuj alportas statistikan ideon pri la kvanta progreso de esperanto en Svislando en tiu periodo.

A.- En februaro 1903 estis nombrataj entute 41 esperantistoj aŭ adeptoj kaj 34 apogantoj. Ambaŭ grupoj pagis la saman jaran kotizon, tio estas du frankojn. Estis konsiderataj adeptoj la personoj, kiuj kapablis skribi en Esperanto. Estis konsiderataj aprobantoj la aliaj.

Cl.- Ni posedas statistikojn koncerne decembron 1904: tiam ekzistis en Svislando 85 organizitaj esperantistoj kaj 96 aprobantoj. Por kontentigi tiujn aprobantojn, oni devis ne nur daŭrigi la aperigon de francaj tradukoj de la ĉefaj artikoloj de Svisa Espero. Oni devis ankaŭ aldoni germanajn tradukojn. Tio ege reduktis la riĉecon de la informado. Pro tio, ekde 1905, oni ĉesos aperigi francajn kaj germanajn tradukojn de la esperantaj tekstoj. Aŭtomate la nombro de la aprobantoj tendencos malkreski, rilate al tiu de la esperantistoj, kio ne estis malbono, sed kio finance estis sentebla.

A.- Ni posedas pere de la decembra numero de Svisa Espero 1906 la adresaron de la tiamaj esperantistoj. En ĝi ni kalkulas, ke la esperantistoj devis superi la nombron de 400, dum ekzistis 77 aprobantoj. La esperantistoj kreskis de 85 al 400, la aprobantoj malkreskis de 96 al 77. Oni povas imagi, ke multaj aprobantoj estis fariĝintaj esperantistoj.

Cl.- Fine de 1907 Svisa Esperanto-Societo aperigis novan adresaron. En ĝi ni povas nombri 601 SES-membrojn. Oni ne plu distingas inter adeptoj kaj aprobantoj.

A.- Dum la postaj jaroj, pro la Ido-skismo, ne plu aperas adresaroj. Kaj la gazeto Svisa Espero ne plu aperigas statistikojn. Laŭ la jarkalkuloj oni povas taksii la nombron de la SES-anoj inter 500 kaj 300, laŭ la jaroj. Sed samtempe multaj esperantistoj nur kontentiĝis aparteni al sia loka grupo, tio tre verŝajne pro financaj kaŭzoj.

Cl.- La tiama SES-kotizo, kiu inkludis la ricevadon de la gazeto Svisa Espero, estis du frankoj en 1903. Iom post iom ĝi altiĝis, kaj en 1917 ĝi atingis tri frankojn. Por anoj de la burĝa klaso, tiu kotizo ne estis tro alta. Sed por laboristoj kaj etfunkciuloj ĝi respondis al la salajro de proksimume 4 labor-horoj. Pro tio la grupoj pagis multe malpli da kotizoj, ol la nombro de iliaj membroj povus kredi. Pri tiu situacio konstante plendadis la gvidantoj de la tutsvisa movado. Sed kion fari? Ne ekzistis policisto, kiu povis obeigi la lokajn grupojn.

A.- Ni raportas pri tiuj sociaj problemoj por montri, ke kio fakte ŝajnas teorie efektivebla, tio en la praktiko montriĝas ofte malfacile realigebla. Kresko de la membraro de Svisa Esperanto-Societo ĝis mil, kaj poste ĝis dumil, estus estinta ebla. Sed unue organizaj problemoj estus devintaj esti solvitaj. La tiama juna societo ne havis la kompetentecon por eĉ konscii pri tiuj problemoj.

Cl.- Samaj situacioj karakterizis la esperanto-movadon en ĉiuj landoj.

A.- Ankoraŭ nun nia movado alfrontas similajn situaciojn.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!